

naŭ komenci solvadi, la lingvan problemon, ĝuste pro la scienca kunlaborado. Dum mallonga diskutado pri la problemo, la raportinto donis ankaŭ plurajn aliajn informojn pri la nuna utiligo de Esperanto sur scienca kampo, ĉar denove montriĝis ke multaj sciencistoj estas tre malmulte informitaj (eĉ misinformitaj) pri la internacia lingvo.

### La intenco publikigi la plej gravajn raportojn

Multaj raportoj havus la intereson ankaŭ por la legantoj de Scienca Revuo, almenaŭ en mallongigita formo. Sed oni devus traduki ilin en Esperanton kaj la publikigo dependas plejparte de la bonvolemuloj pretaj traduki (en kompleta aŭ mallongigita formo), la raportojn. La plejparto de la manuskriptoj, kiujn la redakcio povas disponigi al ili, estas en angla lingvo; sekvas la rusa kaj iom la franca. Ni esperas ke almenaŭ por la plej gravaj raportoj anoncos sin la tradukontoj el tiuj tri lingvoj.

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio

Esperantista, Vol. 19. n-ro 2 (1968)

05 (—77):001.4

### SCIENCAJ REVUOJ EN MALGRANDAJ LANDOJ

(Raporto en la Internacia Konferenco «Kondiĉoj kaj eblicoj por scienca kunlaborado en Eŭropo», Vieno, 1968, Aprilo 16—19)

(Bož. Popović, Beograd, Jugoslavio)

Unu el la taskoj de la Mond-Federacio de Sciencaj Laboristoj, laŭ ĝia Statuto, estas »movigi antaŭen la internacian kunlaboradon en Scienco kaj Tekniko«, Sed »movigi antaŭen« klare signifas: eliminadi ĉiujn obstaklojn ĝenantajn internacian kunlaboradon, eliminadi ilin ne nur proklamante anatemon kontraŭ ilin, sed ankaŭ per ĉiutaga batalo kontraŭ ĉi tiuj obstakloj, la batalon instigantan novajn iniciatojn kiuj helpados ke la obstakloj malaperu.

Neniu aspekto de la malfacilaĵoj por la internacia kunlaborado estas malgrava, precipe se ĝi montriĝas en pluraj domenoj de la kunlaborado. Unu el tiaj aspektoj estas la problemo de la utiligata lingvo. Kia ajn estu la formo de la scienca internacia kunlaborado, certe oni renkontos — en tiu aŭ alia formo — la problemon de la utiligata lingvo.

Por esti konkreta, esploru »la eblecojn plilarĝigi scienca kunlaboradon al ĉiuj sciencaj revuoj« (el la programo de la Konferenco). Por trovi la vojojn por fruktodona plilarĝigo de la kunlaborado sur la kampo de sciencaj revuoj, ni devas unue esplori la aktualan staton de eŭropaj sciencaj revuoj, precipe en malgrandaj landoj.

### Sciencaj esploroj en malgrandaj landoj

En ĉiuj landoj oni faras sciencajn esplorojn. Ĉiuj landoj partoprenas la esploradon — laŭ siaj eblecoj. Ni ne eniros ĉi tie detale la neegalecojn en la kondiĉoj sub kiuj laboras la esplorantoj de la landoj pli aŭ malpli evoluitaj. Same ni ne povas ĉi tie detaligi la klopodojn de la evoluiĝantaj landoj por akiri sciencajn rezultatojn kaj kiom tio kostas ĉe ili pli ol en la evoluitaj landoj. Ni limiĝos nur je la publikigado de la rezultatoj de scienca esplorado, ĉar ne sufiĉas nur kreadi sur difinita scienca kampo — oni devas ankaŭ publikigi tion kion oni trovis dum la esplorado.

Ĉiuj nacioj, grandaj aŭ malgrandaj, publikigas en siaj propraj sciencaj revuoj. En malgrandaj eŭropaj landoj, kiuj ofte estas ankoraŭ en la stato de evoluiĝo, oni malŝparas multe da financaj rimedoj por subteni la sciencajn revuojn. En pluraj kazoj la nombro de la interesiĝantoj por la revuo estas malgranda kaj pro tio la eldonkvanto de la revuo estas tre malgranda. Oni scias aliflanke ke eĉ sciencaj revuoj kun granda eldonkvanto ne povas vivi sen subvencioj de la ŝtato, de diversaj institucioj ktp. Preskaŭ la tuta financa ŝarĝo por sciencaj revuoj en malgrandaj landoj, per tiu aŭ alia vojo, kuŝas sur la socia dorso.

La nuntempa evoluo montras klare ke sciencoj dividiĝas. La sekvo estas ke por multaj sciencaj branĉoj, en malgrandaj landoj, ekzistas specialistoj en tre malgranda nombro. Kaj tamen oni klopodegas trovi eblecojn por publikigadi sciencajn revuojn. Sen tio malgrandaj nacioj perdus tre rapide sian kulturen individuecon. La deziro gardi sian naciecon estas forta ĉe ĉiuj nacioj — grandaj aŭ malgrandaj. Sub tiaj cirkonstancoj multo da sciencaj artikoloj restas nekonataj, aŭ nesufiĉe konataj, nur pro tio ĉar oni publikigis ilin en la revuoj tre malmulte konataj (en internacia kadro). Pro tio sciencistoj de malgrandaj landoj estas malegalaj kun siaj kolegoj el grandaj landoj. Tion oni vidas ankoraŭ pli bone se oni rigardas sciencajn dokumentadon kaj informadon: ili estas reale eblaj nur en kelkaj »mondlingvoj«. Oni organizas informadon kaj dokumentadon ankaŭ en naciaj lingvoj, sed en tre limigita amplekso kaj en speciale gravaj sektoroj, sen multe da sukceso. La malgrandaj nacioj faras tion por protekti sian sciencon sendependecon, por ne dependi absolute nur de fremdaj sciencaj informoj.

### Prolingva neegaleco de sciencistoj

Ĉi tiaj klopodoj de malgrandaj landoj fariĝas tamen pli kaj pli iluziaj. En sciencaj revuoj de malgrandaj nacioj troviĝas regule la resumoj, kaj ĉiam pli kaj pli la tutaj artikoloj, en la »mondlingvoj«. La situacio estus iom pli facila se ekzistus nur unu »mondlingvo«, ĉar tiukaze sciencistoj de malgrandaj landoj devus lerni nur unu fremdan lingvon. Sed en la nuna stato pluraj lingvoj pretendas esti la »mondlingvoj« kaj sciencistoj de malgrandaj landoj devas do lerni plurajn fremdajn lingvojn. El tio devenas nova neegaleco: anstataŭ dediĉi sin al sciencaj esploroj, juna sciencisto de malgranda lando devas malŝpari multajn siajn fortojn por lerni la lingvojn, ĝuste en la aĝo kiam la kreo-forto estas plej granda, kiam novaj ideoj naskiĝas plej facile kaj kiam li devas utiligi la tutan disponeblan tempon por disvolvadi, akceptadi aŭ post scienca kontrolo reĵetadi la naskitajn ideojn.

Sub tiaj kondiĉoj, homoj kiuj facile alproprigas fremdajn lingvojn havas apartan avantaĝon kompare kun la aliaj, eĉ kiam la ilaj estas pli kapablaj en sciencaj aferoj. Speciale oni rimarkas tion dum la kongresoj kaj dum aliaj internaciaj sciencaj kunvenoj. Oni devas havi multe da komprenemo por povi kompreni la situacion de sciencisto kiu povus multon kontribui al solvado de diversaj problemoj, sed kiu ne povas adekvate esprimi siajn pensojn. Al tio aldoniĝas la sento de malsupereco kiam oni diskutas kun kolego en lia gepatra lingvo. Ĉi tian neegalecon certe ne povas facile kompreni sciencistoj de grandaj nacioj, eĉ ne tiuj el malgrandaj nacioj kiuj facile alproprigas fremdajn lingvojn.

Ĉu ni, progresema sciencistoj, povas lasi ĉi tiujn neegalecojn sen pozitiva respondo? Kiel ni povas doni la eblecojn por plilarĝigo de scienca kunlaborado al ĉiuj eŭropaj sciencaj revuoj, se ni lasas ke inter sciencistoj de diversaj landoj ekzistas evidentaj neegalecoj, devenantaj de lingva problemoj? Por eviti ajnan miskomprenon, mi tuj aldonas ke por la nomitaj neegalecoj ekzistas ankaŭ aliaj kaŭzoj, sed ni ne povas ĉi tie eniri ankaŭ tiajn kaŭzojn.

Kiel ni povas fermi la okulojn antaŭ la fakto ke por ĉiuj sciencaj branĉoj ni havas multajn naciajn revuojn, sed preskaŭ neniun internacian revuon? Se ni ne deziras fermi la okulojn antaŭ ĉi tiuj problemoj, sed helpi serĉadon de progresema solvo, ni devas unue vidi kia estas direkto de la evoluo. En ĉi tiu momento, la angla lingvo dominas ĉiam pli kaj pli en plimulto de sciencaj branĉoj. Sed ankaŭ aliaj lingvoj ne montras „blankan flagon“. oni vidas nenian signon ke aliaj lingvoj cedas definitive. Konsiderante la ideon de nacieco, problemojn de sendependeco (kultura, politika ktp.), oni povas tuj konkludi ke unu nacia lingvo niniam povos fariĝi la universala lingvo, nek sur scienca nek sur aliaj kampoj de homa aktiveco.

